Marseille le 17-3-32.

Kara Ka-do-

Ni respondas vian leteron, kiu fariĝis al ni multe da plezuro.

Precipe tre kontentaj ni estas ke vi respondis tiel rapide. Do, Moskvo ni estas tre malproksime! Bedaŭrinde ĝi estas ankoraŭ tro malproksime, kaj ni ne povas tien iri facile, sed malgraŭ tio, ni esperas aliri Rusion post iu tempo.

De post kiom da tempo vi lernas esperanton? Ni tion demandas al vi ĉar ni konstatas ke vi ĝin bone skribas. Kiujn legolibrojn oni uzas en via lernejo.

Ĉu esperanto estas tre disvastigata ĉe la laboristaro en Moskvo?

Proksimume kiom da laboristoj

~~estas~~ parolas esperante en Moskvo?!

Ĉi tie en Marseille ni estas tre malmultajn. La laboristoj estas tre maldiligentaj. En nenia Franca lernejo oni instruas esperanton, pro tio, ~~vi~~ ni ne povas interrilati kun junuloj.

Ni ne estas maljunaj sed tamen ni estas tridek (30) jaraj. La temoj kiuj interesas nin verŝajne ne estas trakteblaj de vi, kiu ankoraŭ ne partoprenas la labormovadon! Do kvankam ni estus tre feliĉaj daŭrigi nian korespondadon kun vi; vi farus al ni la plej grandan plezuron sciigi nin pri laboristo vialando kiu dezirus korespondi kun ni francoj.

Dankon pro viaj sendaĵoj kaj akceptu niajn fratajn salutojn kaj gratulojn por vi kaj viaj instruistoj

Kaj ĝis baldaŭ alian leteron.

A. Bleimet

Vi tre kontentigus min, se al mi vi povus sendi adreszojn de esperantistoj el **Odessà**

Vittone Celestino

Boulevard Rampal 58

Marseille

~~Francia~~ France – B. du. R.

Vittone
Belstino
Boulevard Rampol 58
Marseille
France B. du. R.